6-a Jaro. N-o 271 APERAS  SEMAJNE 12. Decembro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

NACIA EVOLUO EN LA NUNTEMPO


La ĉi-suban pecon mi eltiris kaj tradukis el la broŝuro de Karlo Kaŭtski (Kautsky). La liberiĝo de la Nacioj, *aperinta en 1917. La en ĝi entenata analizo de la rilatoj inter la nacia evoluo kaj ĝia socia fundamento estas plej interesa ankaŭ por la nuna epoko, ĉar la tie karakterizitaj tendencoj estas ĉiam observeblaj en multaj landoj.* *L. L.*

Malgrandaj, progresmalfruiĝintaj nacioj estas sorbataj de grandaj aŭ pli altevoluintaj: tiu procezo estas nerezistebla por multaj malgrandaj nacioj, sed ne por ĉiuj.

La sennaciig-procezo de malgranda, kampkultura popolo trovas fortan kontraŭtendencon tie, kie ĝin kaptas la movado de la moderna demokratio. En interligo kun tiu movado, tiu popolo kreas propran klason el intelektuloj kun propra skribata lingvo kaj forta literaturo; la lingvo taŭgiĝas ne nur por poezio, sed ankaŭ por prozo. Beletristikon povas havi ankaŭ dialekto. Sed nur per ĉiutaga uzado en gazetoj kaj en leteroj, en instruo kaj en la popularscienca literaturo, la skribata lingvo fariĝas lingvo de la popolamaso, politika faktoro; kaj nur tiel la popolamasoj ĝin uzantaj fariĝas moderna nacio. De post kiam popolo atingas tian nivelon, ĝi estas kapabla je nekredebla obstinemo por konservi sian lingvon.

La skribo ĉiam havas konservantan karakteron. Ĝi estas la plej bona ilo por konservi longtempe vivantaj en nia memoro la pasinton kaj ĝiajn produktojn. Tion pruvas i. a. la influo, kiun la Biblio havas ĝis nun. Propra skribata lingvo malfaciligas la alsimiligon de unu popolo al alia.

Kiam en la jaro 1849 Marks kaj Engels havis la konvinkon, ke la aŭstriaj slavoj iros al la sama sorto kiel ekzemple la baskoj kaj la bretonoj, tiuj slavoj ne ankoraŭ posedis menciindan literaturon. Eĉ ĉe la ĉeĥoj apenaŭ komenciĝis la uzado de ilia lingvo kiel skribata lingvo de la popolamasoj. Ankoraŭ malpli evoluintaj



estis la sudslavoj, tiutempe analfabetaj.

Kie en multlingva ŝtato, kampkultura popolo atingas propran skribolingvon kaj per tio ilon por pli firma nacia koheremo, la situacio povas eĉ fariĝi mala. La kamparanamasoj migrantaj al la industriregionoj tie ne nepre perdas sian naciecon. Se ilia almigro estas sufiĉe forta, ili povas repeli la tradician lingvon de la industriregiono kaj finfine superregigi sian propran idiomon. Tiu procezo ankoraŭ nuntempe (tiuj ĉi linioj estis skribitaj en la jaro 1917! L. L.) okazas en la urboj de Bohemio kaj de Moravio.

Sed tia procezo okazas nur tie, kie la fremda almigro estas kompakta kaj supernombra. La ĉeĥa migro al Vieno aŭ la pola al la Ruhrteritorio ne povas difekti la germanan karakteron de tiuj regionoj. La fakto, ke la slava enmigro estas nun movado de amasoj sciantaj legi kaj skribi kaj posedantaj proprajn gazetaron kaj literaturon, povas nur malplirapidigi ilian sorbiĝon. La maljuna generacio ankoraŭ iugrade restas fidela al sia lingvo, sed la nova generacio, naskita kaj edukita surloke, parolas la lokan lingvon, ne tiun de la enmigrintoj.

Ĉia brido al neevitebla evoluo efikas malutile. La malrapidigo de la sorbiĝo de la almigrintoj, la malrapidigata lernado de la loka lingvo, malhelpas la interkomprenon de la laboristoj diversnaciaj kaj malfaciligas la komunan klasbatalon.

La ŝanĝoj de la lingvolimoj estas malplej grandaj tie, kie kampara loĝantaro, elirinta el analfabeteco, akiras la uzadon de la skribata lingvo de sia nacieco. La konservanta efiko de la kampkultura ekonomio tie estas plifortigata per la konservanta efiko de la skribo. En tiaj kondiĉoj, nacio fariĝas speciale persistema. Tiel ĝis nun la germana imperio ne sukcesis atingi, ke la germana lingvo fariĝu popollingvo en norda Slesvigo, en Lotaringio kaj en orienta Poznanio.

Oni vidas, ke la etendiĝo de nacio ne estas io konstanta, sed tre variebla. Ĝia etendiĝo estas plej profunde influata ne nur de kondiĉoj de natura multobliĝo, sed ankaŭ de ekonomio kaj politiko, ĉiam ŝanĝiĝantaj dum la

irado de la historio. Je la epoko de la naskiĝo de la modernaj produktsistemo kaj demokratio, ĉiu el la grandaj modernaj ŝtatoj konsistas el tre diversaj nacioj, parolantaj malsamajn lingvojn. Parto de tiuj elementoj estas alsimiligata al la lingvularo, kiu superregas en la ŝtato per la nombro, la ekonomia kaj la politika forto, kaj dissolviĝas en ĝi. Alia parto rezistas. Ju pli la unua procezo triumfas, des pli la ŝtato alproksimiĝas la tipon de naciŝtato. Ju malpli efektiviĝas tiu procezo, des pli la ŝtato havas la karakteron de plurnacia ŝtato. En la malnovaj kapitalistaj ŝtatoj, superregas la unua tipo. En ili, la alsimiligantaj tendencoj de la modernaj ŝtato kaj produktsistemo povis efiki antaŭ la ekapero de la moderna demokratio kaj antaŭ ol la popolinstruo kreis ankaŭ ĉe pli malgrandaj nacioj la fundamenton por skribata lingvo kaj literaturo de la amasoj. En la ŝtatoj, kie la kapitalista produktsistemo disvolviĝas pli malfrue, dum en ili jam estas efikantaj kelkaj tendençoj de la moderna demokratio, la kreiĝo de naciŝtato per alsimiliĝo de la regataj nacioj al la reganta nacio, fariĝas pli malfacila. Sed ankaŭ tie realiĝas tiu procezo. El la 142 popoloj, kiujn laŭdire kalkulas Rusio, verŝajne ne ĉiuj fariĝos modernaj nacioj, la plejmulto el ili sekvos la vojon de la sorboj kaj baskoj, kiel ekzemple la osetoj, la voguloj, la ĉeremisoj, la kalmukoj, la samojedoj, ktp. Sed parto el ili jam evoluis al moderna nacieco, kaj aliaj sekvos.

Karlo Kaŭtski.

El "Mondo" (Esperanta rubriko).

EL KANADO

Neorganizita laboristaro ĉiam devas suferi

En la fabriko Ŭelnd (Welland), kie laboras multaj laboristoj, estas produktataj diversaj feraj kaj ŝtalaj tuboj. Malgraŭ ke la elspezoj por konsumobjektoj ĉiam plialtiĝas, la kompanio provas malaltigi la laboristajn salajrojn. La laboristoj devas labori 10 kaj 12 horojn nokte kaj ricevas 31 cendojn hore, 3,10 dolarojn tage. Pasintjare la kompania profito estis 2 milionoj da dolaroj, dum al la 800 laboristoj devis sufiĉi horsalajro de 31 cendoj. Cetere la kompanio, por altigi sian profiton, venigis al si spertulon el Usono, kiu promesas akirigi al la kompanio plian jaran sumon de 80 mil dolaroj, per ŝparo de laborfortoj: Kie nun laboras 10 homoj, sufiĉus laŭ lia plano 7 laboristoj. Kie nun laboristoj ĉe fornoj laboras 20 minutojn kaj ripozas 20, la spertulo eltrovis, ke la laboristoj povus senpaŭze labori 40 minutojn kaj poste sufiĉus ripozo de 20 min. Krome, la kompanio aĉetis novajn maŝinojn ie en Germanio, per kiuj malbezoniĝas laborfortoj.

En nia fabriko ne ekzistas laborista unuiĝo, kaj antaŭ alveno de l' spertulo la kompanio ne havis kontakton kun laboristoj. Nun pendas en diversaj lokoj de la fabriko afiŝoj kun surskriboj, ke laboristoj pensu kaj eltrovu novajn objektojn kaj maŝinojn (por pligrandigi la profitojn de l' kompanio). La laboristoj estu patentuloj. Sed ĉi lastaj kontraŭstaras la kompaniajn dezirojn kaj depostulas 25% da salajra plialtigo. Tamen, laŭ mia opinio, estante sen-unuiĝaj, ili verŝajne nenion povos atingi . . .

Al la 70-jara naskiĝdato de Zamenhof!
(1859—1929)
Ĵus aperis ĉe SAT
ZAMENHOF
de E. Drezen
La mondkoncepto de Zamenhof. / Z. kiel iniciatinto k teoriisto de esperanto.
49 paĝoj — Formato 13×17 cm.
Prezo: 0,70 mk. g.
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Striko en Nacia Ŝtalvagonara Kompanio

Jam du monatojn daŭras striko de laboristoj en tielnomata Nacia Ŝtalvagonara Kompanio, kaŭzita per la ekscesoj de l' kapitalistoj. Ĉar nuntempe regas granda senlaboreco en Kanado, la entreprenistoj vidis, ke ili povas kapti naivajn laboristojn por malalta pago kaj ĝenerale malaltigi la salajrojn. En multaj Kanadaj fabrikoj laŭ peclaboro la laboristoj havas mezan salajron de 4 dolaroj tage. Tiel en la ŝtalvagonara fabriko en Hamilton laboras 2000 laboristoj, preskaŭ ĉiuj laŭpece. Kiam la kompanio malaltigas la salajrojn, la laboristoj komencis striki. Post kelkaj semajnoj la afero pli kaj pli malboniĝis por ili, ĉar ili ne plu havis monon por pagi loĝejon kaj manĝojn. Multaj laboristaj familioj jam estas elloĝigitaj. La strikkomitato petis la urbestron permesi kolekti monsumojn surstrate por subteni malsatajn strikant-familiojn. Ĉe la fabriko ĉiam ariĝas la strikantoj petante senlaborulojn ne fari strikrompajn laborojn. Fakte multaj senlaboruloj kuniĝis kun la strikantoj kaj subtenas ilian aferon. La entreprenistoj ordonis al la polico gardi la fabrikon. Bedaŭrinde la strikantoj ne estas sindikatanoj. Tamen aliaj laboristaj organizoj en multaj urboj kolektas monon por subteni la batalantojn. Tiel ili esperas povi daŭrigi la batalon.

Laborist-junularaj grupoj aktiviĝas

En Kanado ekzistas nun multaj lab. junularaj sportgrupoj. Kvankam ĉi tiuj organiziĝis nur antaŭ nelonge — multaj kreiĝis nur en tiu ĉi jaro — ili jam havas bonajn sukcesojn. Preskaŭ en ĉiuj urboj kaj urbetoj ekzistas laborist-junularaj sekcioj, kiuj praktikas en siaj grupoj diversajn sportludojn kaj instrumentan muzikon. Ili posedas multnombrajn orkestrojn. Ili ludas por siaj celoj en laboristaj domoj; ankaŭ dungas ilin burĝaj teatroposedantoj por koncertludi antaŭ la publiko. Ofte ili ludas por radioondoj kaj tiele disvastigas siajn laboristajn ideojn inter laboristaj amasoj tre vaste tra Kanado kaj tuta Ameriko. Preskaŭ en ĉiu sezono laborista orkestro de l' junularo trapasas multajn provincojn por ludi siajn muzikaĵojn al laboristoj en urboj kaj vilaĝoj.

Tiel ili mem akiras kleriĝon kaj spertojn kaj organizas okaze de siaj vojaĝoj en provinco novajn similajn grupojn. Por sporta agado ja mankas spertaj perantoj. Sed entute la laboro de tiuj sekcioj estas tre fruktodona, kaj por dezirinda interligiĝo kun alilanda laboristaro mankas al ili nur la interńacia lingvo. *F. Grydzan (13 341).*



Letero el Jugoslavio

Se ni skribas tiun ĉi leteron, ni faras ĝin kun la celo iom informi la legantojn pri la stato de l'laborista movado en tiu ĉi lando. "S-ulo" jam konigis siatempe, ke depost la 6. januaro 1929 regas ĉe ni malkaŝa diktatoreco de militista kaj grandkapitalista kastoj. Laŭ la manifesto tiuokaze eldonita de la diktatoreca registaro, ili pravigis sian agon per la asertoj, ke necesas urĝe restarigi la jurstaton, la liberecon, ordon kaj leĝecon, kiun laŭ ilia opinio la maltrafe aganta parlamenta reĝimo endanĝerigis serioze. Sed tiu nova registaro, anstataŭ plenumi la publikigitan promeson, eĉ pli multe subpremi komencis la popolan liberecon. Per propraj dekretitaj leĝoj ili simple malpermesis ĉian liberan pensadon, ĝenerale ĉiujn kritikojn. Speciale al laboristoj estas malpermesita ĉia libera ago, organiziĝo, eldono de presaĵoj, strikrajto, sume ĉiu ajn organizado, kiu havus kiel celon plibonigi la staton de l' laborista klaso. (Nature, male, al burĝoj ĉio estas permesata). Tiel ili sukcesis disdividi ĉiujn laboristajn sindikatojn, kiuj havis pure klasbatalan karakteron kaj organizon. Multaj laboristaj hejmoj estas fermitaj.

Sole permesata estas la funkciado al tielnomataj U.R.S. (Unuiĝintaj laboristaj sindikatoj), kiuj preskaŭ nenion signifas por la laboristaro, ĉar ili havas nenian popularon inter laboristaj amasoj. Ili estas konstruitaj entute el

burokrataj elementoj, kiuj staras sub la efiko de l' nuna reganta reĝimo kaj dependigas sin de ĝi. Tiuj burokrataj elementoj ne havas kuraĝon malkaŝe okupi sin pri la interesoj kaj postuloj de la laborista klaso. Ĉiuj ja estas dungitaj sur la postenoj de laboristaj institucioj: Laborista Ĉambro, laborista asekuro ktp., kun grandaj salajroj. Kaj kompreneble ili timas, ke ili perdus siajn bonajn altpagatajn postenojn, se ili okupus sin malkaŝe pri batalo por la laboristaj rajtoj.

La nuna registaro nuligas iom post iom la aŭtonomion de laboristaj institucioj. Ĝi dividas kaj forigas la administrantajn komitatanojn de tiuj institucioj kaj anstataŭigas ilin per propraj (komisaraj) administrantoj. Antaŭ kelkaj tagoj ĉiuj oficistoj de l' ĉi tieaj aŭtonomaj laboristaj institucioj estis devigataj solene plenumi la fideljuron por la ŝtato kaj registaro. Tio estas la signo, ke la nuna regantaro pretiĝas ĝenerale nuligi ĉiujn memstarajn laboristajn instituciojn. Tiele ĉe ni por la laboristaro estas tute maleble entrepreni iun ajn movadon (inkluzive SAT-movado) kaj disvolvi la klasbatalon.

Sed malgraŭ tiuj severaj leĝoj kaj la teroro aplikata de l' estraro regas en laboristaj rondoj granda optimismo, ke tiu stato ne povos daŭri longtempe, ke la laborista klaso rekonsciiĝos kaj komencos unuiĝinte sian batalon ĝis la finvenko por pli bela, pli vivinda estonto.

Jug. SAT-anoj.

"LA TIGRO" MORTIS

Kiel tigro, kiu rabante, atakante, detruante vivojn paŝas tra la solecejoj de l' ĝangalo, kaj evitas la kuniĝon kun aliaj vivaĵoj, krom por ilin neniigi — tiel Georgo Klemanso (Clemenceau) elpaŝis, agadis inter la homaro, granda individuisto sen kolektivsento, kiu malestimis la homaron, la kolektivon same kiel la personojn.

Malgraŭ tio lia morto (lastsemajna) estis okazo por la tutmonda burĝa gazetaro, kaj eĉ por kontraŭuloj emfaze laŭdegi lin per plej flataj paroloj. Spite tio, ke li uzis sian potencan influon, siajn grandegajn personajn kapablojn — li estis pasia, elokventa oratoro, ankaŭ literaturisto, ĵurnalisto kun vigla, klara stilo kaj senkompara dialektiko — nur por detrui . . . li estis multe pli detruanto ol konstruanto . . . Ne mirige, ke de siaj, etaj apud li, samtempuloj li estis timegata, estis malamata ofte . . . Post liaj paroladoj en parlamento ja renversiĝis ministerioj. Li kontraŭbatalis la Eklezion, la koloniismon, ofte ankaŭ la maljuston. Sed li batalis — pro la plezuro batali. Idealon li ne havis. Li fariĝis Akademiano, kontraŭ sia volo, sed neniam "honoris" tiun institucion per sia ĉeesto!

En junaĝo altirita al la politiko, li estis malkaŝa respublikano sub la Imperio, estis kiel tia eĉ arestata. En 1871 dum la Komuno li estis urbestro en unu Pariza urbdistrikto, sed jam tiam li estis malkonsekvenca (kiel cetere dum sia tuta vivo): li estis nek versajano, nek komunano . . . jam tiam plej tipa reprezentanto de l' etburĝa klaso (li ne estis kontraŭ la Komuno en tiu senco, ke la Komuno ne nur estis klasa, sed samtempe nacia movado). Vane oni serĉus poste konsekvencon en lia vivo: kun ia sovaĝa ĝojo li ŝatis frakasi la idolojn de l' tago; li ĵonglis per la ideoj, ne havis ian disciplinon, ian doktrinon; sed tia individuisto, li akomodiĝis tre bone al la nuna socio, li ne konis indulgon por la malfortaj, nek solidaron. Kaj



tial li, iama respublikano persekutita, provis terorigi la laboristaron kaj abomenis la revolucion.

Oni nun komprenas, kial la burĝaro kaj la ĵurnalistoj, kvankam ili timis la kapricojn de tiu eksterordinare forta persono kaj liajn emojn al ĥaosigo, pardonis al li ĉiujn ekscesojn kaj eĉ laŭdegis lin ĉe lia morto pli ol iun ajn tra la gazetaro. Ĉar esence li estis la plej bona kaj distinga tipo de l' burĝaro. Kaj estas unu fakto, kiu precipe pacigas kun li la burĝan klason: historie unuaranga fakto, la venko en la mondmilito, la laboro de Klemanso por la patrio kiel ministro-prezidanto dum epoko plej malluma. Jen vere tiu homo evidentigis plej potence siajn kvalitojn; tiaulo bezonis efektive tian katastrofon, kia la mondmilito, por plene elvivi sin mem, por ĝis ekstremo ekflamigi la naciajn pasiojn per la forto de sia parolo. En momento, kiam tiuj pasioj komencis malfortiĝi inter la buĉiĝantaj proletoj sur la batalkampoj, fine de 1917; en momento, kiam Rusio rezignis plue partopreni la kapitalistan buĉadon, farinte sian revolucion . . . Tiam Klemanso estis vere li mem, pasiulo ĉiam, sed nun kun "sankta misio", kiel li mem esprimis sin, por "plenumi la liberiĝon de l' popoloj de la lastaj furiozoj de l' abomenega forto . . ." Lia pasio kulminis en la rolo de patrioto, en la ŝovinismo . . . Li trinkis homan sangon kiel vampiro, kiel tigro . . . La *milito* estis por li ĉio, estis por li la normala stato . . . Kaj se la gazetoj hodiaŭ memorigas, kiel li persone iris en la unuajn tranĉeojn por rekuraĝigi la soldatojn, ili forgesas diri, kiel en la lando li aplikis la plej malnoblan polican teroron kaj kontraŭbatalis siajn kontraŭulojn per plej fiaj rimedoj, falsigitaj dokumentoj ktp. Se iu enkorpigis la militarismon, estis Klemanso . . . La "Tigro" fariĝis tiam "La Patro-Venko" por la francaj patriotoj.

Oni ne malmemoris pri tio. Kelkajn monatojn post la packontrakto li malsukcesis en baloto pri prezidanto de l' respubliko kontraŭ maldekstrula kandidato. Kaj tiel la maljuna sovaĝulo retiriĝis el la publika vivo. Pasis lia tempo, novaj faktoroj komencis influi la popolojn, kaj iamaj politikaj roluloj forfalas al ridindiĝo.

Kvankam testamente li rifuzis ĉiajn honorojn kaj ceremoniojn ĉe la enterigo, li tamen ne kapablis esti tute konsekvenca ateisto. Li volis, ke lia kadavro estu transportata el Parizo en Vande-on (Vendée) por esti tie enterigota apud la kadavro de sia patro en soleca loko de familia bieno.

La kadavro de la "Tigro" sendube sanktigas la patrian teron. Kaj tio memorigas al ni la vortojn de Niĉe: "Niaj (t. e. nuntempaj) ateistoj estas piaj homoj."

La Esperanta Vortfarado
laŭ la Fundamento
de **Paul Fruictier**

Unika verko en nia lingvo, kiu detale pritraktas la derivadon kaj la signifon de l' afiksoj kaj de l' prepozicioj. La sola libro, kiu faciligos al vi la komprenon de la vortfarada meĥanismo.

Prezo: 1.80 mk. g.
Haveblaj ĉe la Administracio de SAT.

Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

(4-a daŭrigo. Vidu n-ojn 267/70)

Ĉe Ford

En fabrikoj ŬAJT en Klivlan (White, Cleveland), temperoj estas severe studataj. Laboroj estas grandskale laŭpece pagataj. Ĉe Ford ne: ĉiuj ricevas horan salajron, komence 5 dolarojn potage, post du monatoj 6 dolarojn, kaj poste pli, laŭ laborspeco kaj laŭ servodaŭro. Nur fakuloj, kiel Dübreŭj mem: il-faristo, povas tuj pli multe ricevi dungiĝante.

Ĉe Ford ne tempo-studistoj: la ĉeno estras mem la laborrapidon, kaj rezultas produktado tiom intensa, ke 5-taga laborsemajno (40 horoj = 8 horoj potage) enkondukiĝis.

Ford malamas malpuron de l' maŝinoj. Ĉio brilas ĉe li, vi tion tuj rimarkas vidante la eksterajn lokomotivojn de tiu fabrikejo.

Sed iom brute ĉio fariĝas: Dübreŭj ŝanĝis laboron. Lia laborkarto ne sufiĉe rapide sekvis lin en novan laborejon, (administraĉado?) — kaj li ne povis "punkti" (kontrolstampi) sian karton la unuan tagon de l' ŝanĝita laboro. — Do mankis unu tago en lia salajro. Juna librotenisto, al kiu li plendis, rifuzis ordoni la facilan kontrolon, ke Dübreŭj laboris tiun tagon. Tiel Ford ankoraŭ ŝuldas al Dübreŭj *7,20 dolarojn.*

Ford ne akceptas intertrakti kun sindikatoj.

La laboro, ĉe Ford, estas sama kiel en multaj fabrikoj, sed pli perfektaj maŝinaro kaj raciigo produktas pli ne premante pli da laboristaro.

Kooperativo: En Fordaj fabrikoj vendiĝas la produktoj iom malpli karaj, aŭ samprezaj kiel ĉe urbvendistoj en Detroit. Tre malkaraj estas la produktoj de l' *farmoj Ford,* kaj koakso, benzino, sub-produktoj de la Ford-fabrikoj mem. "Patronadaj asocioj", kiuj en aliaj entreprenoj tiom ne-diskrete kontrolas la laboristaron, ĉe Ford ne ekzistas.

Ordonoj ĉe Ford estas ofte tute "soldatestraj", kiel ni jam rimarkigis. Ekzemple oleumisto verŝis maŝinoleon en Dübreŭjan maŝinon, ne konsultante lin, ne observante neceson aŭ malneceson de oleumo por tiu maŝino: li ricevis ordonon oleumi, li oleumis la tutan tagon, abunde, trankvile, superŝute. Oleo malagrable makulis la vestaĵojn de l' apud-laborantoj, fluis teren. Li oleumis. Ofte Dübreŭj observis samajn "soldataĉajn" obeojn-ordonojn.

La kuracejo ĉe Ford devas "vivi per si mem", enspezi per kuracado tiom, kiom ĝi elspezas kuracante. Tiel Ford mem deklaras, ke neniu ŝuldas al li kurachelpon, kvankam senmonuloj ankaŭ foje senpage akceptiĝas ĉe tiu Forda kuracejo.

Same "vivas per si mem" eĉ fakaj lernejoj de l' Ford-fabrikoj; la lernantoj riparas ilojn, erojn de l' fabriko, kaj tiel ili bone lernas kaj samtempe pagas la elspezojn por la fak-lernejo.

Pli antaŭen ol Fordismo

Dübreuj supozas paroladon inter Ford kaj Furie (Fourier), deknaŭjarcenta franca sociteoriisto, kiu proponis jam antaŭ la maŝinismo falansteron (= mastrumad-kolektivon), en kiuj la homoj harmonie-konkurence kunlaborus.

Ford dirus al la teoriulo: "Vi estas frenezulo! Necesus vin enŝlosi en frenezul-hospitalo, por vin kuraci!" Furie' tiam respondus al Ford: "Vi estas brutulo! Necesas enŝlosi vin ankaŭ, ĉar vi suferigas en industrio la malfeliĉajn homojn!"

Sed eble, oni sukcesus diskutigi ilin pli afable, kaj interesegaj konkludoj rezultus poste, supozas Dübreuj. Denove li proponas *demokratigon* de l' laboro.

Ĉe Ford, la direktantoj de l' laboro ne ricevas moŝttitolojn. Ĉiu kunlaboras laŭ sia emo, kreas sian fakon, sen limoj signitaj inter la fakoj. Ford esprimas en du libroj la deziron, ke oni instruu al ĉiuj ekonomiajn realojn: "Ĝis la popoloj ĉiuj estos "egale vendantoj kaj aĉetantoj, egale produktantoj kaj konsumantoj, kaj ekvilibrigos la produktadon *ne por profito,* sed nur *pro tuthoma utilo, ni vivos en ĥaoso.*" Ni notu tiujn vortojn de Ford mem. Kapitalismo estas ĥaoso, ĝis tiam, kiam . . .

Ford denuncas egan fuŝadon de produktaĵoj en Usono, kiun en siaj fabrikoj li kontraŭbatalis. Prezidanto Huv'r (Hoover) ankaŭ agas kontraŭ tiu malŝparemo, skribas Dübreŭj.

Furie' same malamis komercan ĥaoson. Pomo estis vendita al li por 70 centimoj en Pariza restoracio. Li sciis, ke en najbara franca kamparo oni ricevis pli ol cent pli belajn pomojn por samaj 70 centimoj: do, komercistoj estis ŝtelintaj 95 ĝis 98 elcentojn je la prezo de tiu pomo, enkalkulante 1 ĝis 4% da veraj transport- kaj komerc-kostoj. Tiu fakteto estis por Furie' eklumo socialisma, kaj li fariĝis socia verkisto, rakontas Dübreŭj.

Ford denuncas samajn fi-uzojn de kapitalismo. Li skribas: Lando, kiu vendas porkojn, devus eksporti ilin nur sub konsumebla formo: konservoj, lardo, ŝinkoj, ktp. Kotonaj fabrikoj devus troviĝi apud koton-kampoj. Dübreŭj rimarkas, ke tiuj ideoj estas socialismo mem, teknika parto de socialismo.

Kiam Dübreŭj laboris ĉiutage en bruego de speciale orel-vundaj Fordaj metiejoj, li perdis ŝaton por legi, aŭskulti lekciojn. Li preferis kinon, ĉar senbrua. Liaj kunlaborantoj ankaŭ. En ĉen-laboro apud meĥanika aermartelo, li eĉ ne povis aŭdi voĉon de italo, kiu tute apude kantis por li francan muzikaĵon. La italo tiam protestis kontraŭ tiu mortiga bruego, blasfemante ĉiujn nomojn de la "Madona" (Jesu-patrino), sed ankaŭ tion nek homoj nek dioj aŭdis.

Dübreŭj ankaŭ protestas kontraŭ noktlaboro, kiun devos baldaŭ forigi sufiĉa tagproduktado, — kontraŭ malbelo de laborejoj kaj manko da plena suna lumo en ili, kiuj kreis tiun speciale malbonhumoran karakteron de l' laboristaro, — kontraŭ tro longdaŭra vojaĝado inter hejmo kaj laborejo: Multaj Fordaj laboristoj, kiel multaj Parizaj, vojaĝis *duhore* matene, *duhore* vespere por iri al laboro kaj reveni hejmen. Dübreŭj mem, elektinta pensionon *sufiĉe* proksime, vojaĝis laborejon kaj reen dum tri duonhoroj tage.

Kvintaga, tio estas 40-hora laborado dum semajno tre plaĉis al li kaj al ĉiuj: du plenaj tagoj liberaj inter sep, do de vendredo posttagmeze je la dekkvina aŭ deksesa horo, ĝis lundo frumatene. Ford ŝatas tiun liberon, ĉar dum tiuj libertagoj la laboristoj *konsumegas* (malŝparado, iom, -bona vivo, iom) *kaj tiel funkciigas industrion.* Dübreŭj ŝatas tiun liberon *pli* pro tio, ke tiam la laboristo povas spirite kulturiĝi, se li volas.

(Daŭrigota) *Jief.*

Vortoj de Prof Cart

devas troviĝi sur la tablo de ĉiu, kiun interesas la evoluo de esperanto.

La dua libro post Lingvaj Respondoj de Zamenhof; ĝi devas esti atente studata kaj relegata.
Prezo: 2.— mk. g.

Haveblaj ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

Zamenhofa Saĝo

Kvankam ĉiuj ekzistantaj religioj parolas pri kunfandiĝo de la homaro, ne sole neniu el ili donis ian rimedon, por tion atingi, sed kontraŭe, ĉiu el ili rekte malhelpas tiun ĉi kunfandiĝon: ĉiu el la religioj ja diras, ke ĝi estas donita de Dio, sekve tute konsekvence ĉiu religio devas rigardi ĉiujn alireligiulojn kiel pekantojn kontraŭ la ordono de Dio, kaj la akcepton de iaj aliaj religiaj formoj krom ĝiaj ĝi devas rigardi kiel krimon kontraŭ Dio.

El "Ruslanda Esperantisto" 1906.

NACIISMA REVIVIĜO EN LA NOVA RUSIO

Fiereco je Propra Lando kaj Izoligo de Eŭropo. Ekonomia Rekonstruo

De la Speciala Korespondanto de la London'a "Daily Herald", (Ĉiutaga Heroldo), lastatempe vizitinta Sovetion, s-o Mikael Farbman

La diplomatiaj rilatoj inter Sovetio k Britio baldaŭ restariĝos. La X-a Kongreso de SAT okazos en Londono. Tiuj du faktoj instigis min traduki jenan artikolon, por ke niaj K-doj eksciu, kiel korespondanto de la sola en Britio ĉiutaga laborista ĵurnalo prijuĝas la Sovetiajn aferojn.

Ĉu la aŭtoro juĝas objektive aŭ ne, tio estas tute alia demando, al kiu, kompreneble, mi ne povus respondi. Trad.

Unu el la plej frapantaj impresoj pri moderna Rusio, kiujn mi ricevis el mia plej lasta vizito al tiu lando, estis sento pri la reviviĝo de la naciismo.

Mi diras reviviĝon, sed mi devus diri naskiĝon, ĉar la naciismon, laŭ la ĝusta senco de tiu vorto, Rusio neniam antaŭe havis.

Dum la cara epoko la popolamaso neniam atingis la stadion, en kiu eĉ primitivaj ideoj pri naciismo povus evolui.

La superaj klasoj estis aŭ nebule kosmopolitaj aŭ ĝisoste ŝovinistaj; ili neniam kreskigis naturan amon al sia lando.

La naciismo en Rusio estis ĉiam malestimata kiel identa kun la plej malbona speco de politika reakcio kaj kun malestimego kaj malamo kontraŭ ĉiuj subigitaj gentoj en Rusio, t. e. la "Inorodzy", aŭ "malsame naskitoj", la fremduloj, inter kiuj estis poloj, ukrainoj, hebreoj kaj armenoj.

La naciismo estas montrilo de karaktero, kaj unuavice sin malkaŝas kiel fierecon pro la lando. Oni povas prave aserti, mi kredas, ke nur post la Revolucio la rusoj eksentis tiun ĉi fieron, sin identigis kun sia lando.

Kiam mi estis lastfoje en Moskvo, mi ofte haltis antaŭ librobutiko, en kies montra fenestro elmetiĝis afiŝo, prezentanta junajn viron kaj virinon, manon en mano, kun feliĉaj ridetoj sur la vizaĝoj. La fono de la bildo montris la kamparon kaj kelkajn fabrikojn; kaj la klariga teksto sub la bildo estis: "Nia Lando". Oni povis tiom facile legi tion ĉi en la vizaĝoj de la gejunuloj, ke la subskribo ŝajnis esti preskaŭ superflua.

En malnovaj tempoj la rusoj rezignis morti por sia lando; hodiaŭ por la unua fojo, ŝajne ili ĝuadas vivi por sia lando.

Tiu vekita amo al la lando kaj la renaskiĝanta ĝojo en la vivo estas elstarantaj karakterizoj de Sovetio. Neniam antaŭe en Rusio estis tia dezirego al vojaĝado; junaj rusoj eltrovis la unikan geografian situon de sia lando. Ili sin movadas sur ĝi per fervojo, vaporŝipo kaj per la vojoj. Sufiĉegas turismaj kaj veturaj agentejoj, kiuj organizas ekskursojn, kaj miloj utiligas ĉi tiujn faciligojn; sed multe pli da ceteraj troviĝas vagantaj sen konduktoroj.

Al tiu ĉi eltrovo de lando kaj kreskanta sento pri aparteno al ĝi oni devas aldoni dekkvin-jaran izoligon de la cetera mondo, se oni volas kompreni la veran signifon de la nova rusa naciismo. La fundamenta rezulto de izoligo estas, kompreneble, la kreskado de tuta generacio senigita je ĉia intelekta kontakto kun Okcidenta Eŭropo. Tio ĉi per si mem devis produkti ian mallarĝan kaj provincecan vidpunkton. Sed oni devas konstati, ke tio, kio estas trudita al Rusio, estis ne nur izoligo, sed izoligo kune kun malamikeco. Sekve ilia ofendiĝo naskis maldolĉan obstinegon, kiu, kiel kutime ĉe tiaj okazoj, sin esprimas per troigita speco de naciismo.

Plua faktoro, kiu helpas la formadon de la nuna rusa spiritostato, estas la komparo de la nuna periodo de kreskanta prospero kun la jaroj, kiam la lando devis lukti kontraŭ malriĉo, malsato, kaj senigo je ĉiaj rimedoj de fizika kaj intelekta kulturo.

La nova sento pri jamaj atingaĵoj kune kun la firma volo efektivigi grandiozajn planojn sociajn kaj ekonomiajn, neeviteble emas rezultigi,ke la moderna rusa naciismo estu karakterizata per iaspeca superabundo kaj manko de ekvilibro. Ke estas danĝeraj elementoj en tiu ĉi reviviĝo, kiuj eble evoluos je apartemo kaj sinestimo, oni ne povas nei. Tamen, pririgardate entute, la moderna rusa naciismo aperas kiel sana movado. Ĝi ŝajne respondecas je tiuj vigleco, energio kaj freŝeco, kiuj estas la rimarkindaj trajtoj de la hodiaŭa rusa vivo.

Sed, eble oni demandos, kiel tio rilatas al la rusa Revolucio kun sia trudema Internaciismo kaj sia subkomprenata neado je Naciismo? Ni povas nur respondi, kvankam ŝajne paradokse, ke spite sia endoktriniĝo kun Internaciismo, la Rusa Revolucio estas nenio, se ĝi ne estas esence nacia. Ĉiu granda revolucio inklinas al prozelitismo kaj vastigas ian infekton.

La Rusa Revolucio ne estas escepto en la regulo; kaj la bolŝevikoj certe faris sian eblon por disvastigi, kiom eble plej multe, siajn doktrinojn. Mi ne dubas unu momenton ilian aliĝon al la religio: Monda Revolucio, sed mi ĉiam sentadis, ke ilia plej granda zorgo estis la sorto de la Rusa Revolucio kaj la sendanĝereco de la Rusa Ŝtato.

Tute sincera, mi estas konvinkita, ke la nura priokupo estas la ekonomia restarigo de la lando kaj ĝia levo al pli alta kultura nivelo. Ĉiu nova "venko ĉe la ekonomia fronto" — la bolŝevikoj ŝatas alpreni militajn metaforojn — la konstruado de nova fabriko, la malfermo de elektro-stacio, la eltrovo de petrolo en Uralo aŭ de nitrato apud Murmansk, estas solenata kiel nacia festo.

Tamen, la plej bona provilo pri la spirita stato de la gvidantoj estas tralegado de la ĉiutaga gazetaro en Rusio. La bolŝevika gazetaro estas ja unika institucio. Ĝia celo, malsama je tiu de ĉia alia gazetaro, ne estas liveri informon, ne amuzi, ne instrui. Ĝi celas konigi la "ordonojn por la tago" en la ekonomia milito. Ĵurnalaj artikoloj preskaŭ senescepte celas ĉu inspiri al la laboristaro fidon, ĉu stimuli ĝian devosenton al la Ŝtato. La plej eta malsukceso ĉe unu sektoro de la fronto fariĝas la kialo por rimarkigo kaj alarmo. Estas ja rimarkinda fakto, ke, dank' al tiu ĉi obsedo al la interna (ekonomia) fronto, alilanda novaĵo preskaŭ tute forestas en ĉiuj ĵurnaloj.

Kiel leganto dum du monatoj de la rusa gazetaro, mi plendas malpli pro tendenca prezentado de alilanda novaĵo, ol pro la pritrakto de tia novaĵo kiel neatentindaĵo kaj pro ĝia efektiva foresto en la ĵurnalaro.

La bolŝevikoj estas supozataj esti, kaj mem fanfaronas, ke ili estas misiistoj de la Internaciismo; sed de proksime rigardate, ili aspektas iom izolaj. Ili interesiĝas pri la ekstera mondo, ĉu amika aŭ malamika se mi ne eraras, nur tiom, kiom ĝi tuŝas Rusion. Ja, se oni analizus detale la celojn kaj metodojn de bolŝevika propagando en Okcidenta Eŭropo, tre verŝajne ne estus malfacile konstati, ke ili celas malpli al la realigo de Mondrevolucia kataklismo, ol al la asekuro de la sendanĝereco de Rusio.

Do, se oni nur konscius pri la fakto, ke Rusio kaj la Rusia Revolucio hodiaŭ trapasas naciisman barakton, multaj admirantoj de la bolŝevismo (kaj ankaŭ multaj malamikoj de tiu sistemo) facile forlasus la absurdan kredon, ke tio, kio okazas tie, devas esti transplantata al la cetera mondo. Se ili nur povus senigi sin je tiu ĉi obsedo, kaj juĝus Rusion nur laŭ rusaj normoj, ili akirus pli bonan perspektivon por pririgardi la landon, kaj por prezenti al si pli ĝustan bildon pri ĝia intelekta vivo.

El la "Daily Herald", 19. 10. 29, sen permeso tradukis 2978.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

EL PROVERBARO ESPERANTA

Eĉ blinda kokino povas trovi grajnon.

*

Amiko estas kara, sed vero pli kara.

*

Kutimo estas dua naturo.

*

Tro rapida laboro, tro malgranda valoro.

*

Kiu iras sperte, iras certe.

*

Venas proverbo el popola la cerbo.

DISKUTEJO

Kiel ni jam diris, ni ricevis pri la temoj "sana vivado" k "nudkulturo" ankoraŭ sufiĉe multajn manuskriptojn, kiuj ĝenerale substrekas sole la jam diriton. Ni tial nur ekstrakte konigas ilian enhavon, rilate al punktoj aldonantaj ion novan. — Red.

Sub la titolo "suno, aero k sparta eduko" K-do N. Barmin, Sebastopol, (la sama K-do, kies "figfolia" artikolo venigis tiom da protestoj), revokas en nian memoron la bildon de l' antikva Sparto kun ĝia sporta edukado de l' infanoj. "Por la infanoj en Sparto okupado k edukado konsistis el la lukto, kurado, celĵetado de disko kaj lanco. Knaboj k junuloj spartaj dum la tuta jaro iris nudpiede, kun malkovrita kapo, en malpeza vesto, k dum somero k vintro banis sin en rivero Evroto, dormis sur kano, kovrante sin per nenio, k manĝis tre malmulte. Knabinoj k junulinoj ricevis la saman severan edukon k okupis sin per gimnastiko . . . Ni tute forgesis tiun spartan edukon, ni malŝatas sunon, aeron, sporton, tial ni estas 'treege delikataj'. For tiun ĉi 'malsanigan delikaton'! Vivu sana spartana spirito!..." (Nu do! Kaj la — nudo?)

K-do 7658 (St. Pölten, Aŭstrio), parolante pri somera k vintra vivado, opinias, ke la artikoleto en n-o 258 (pĝ. 519) estis tro koncize verkita. "Ne ĉiu scias malhelpi sunfrapon. Multaj proletoj en printempo aŭ komenco tro uzas sunbanon, tial la haŭto k la tuta homa korpo suferas. Certe la suno detruas mikrobojn malkonstruantajn homan korpon, sed malĝusta uzado de somera suno en komenco povas esti mortig-danĝera . . . precipe sur altregionoj, montoj . . ." Li opinias, ke proletoj jam devigataj tre nehigiene loĝi pro mizero, devas tre atenti laŭeble apliki higienajn regulojn en siaj loĝejoj: ekz. oni ne toleru hundon k infanon en unu ĉambro, ĉar hundo enportas malpuraĵon k insektojn, ĝia elspirado ne estas saniga (precipe dum nokto hundo ne estu en komuna ĉambro kun homoj).

K-do Eŭg. Blinov (Sovetio) opinias, ke homara honto k seksmoralo estas similaj al naiveco de struto, ke ni ne devas hipokriti rilate al niaj seksorganoj. Li citas la konatan germanan profesoron Bölŝe (Bölsche), kiu skribas en "Amo k Naturo": "Mi kredas, ke alvenos tempo, kiam liberigita de antaŭjuĝoj, la homaro forĵetos de si figan folieton k seksorganoj estos nudigataj antaŭ la tuta mondo kiel la simbolo de vivo k amo." Li opinias, ke la nudkulturo sanigos seksajn instinktojn, plibonigos homan specon k sekve feliĉigos homaron.

K-do 6326 (Germanio) opinias, ke la nudkultura demando certe estas aktuala (kvankam li konsentas, ke ekz. por la sovetia proletaro la demando nuligi analfabetecon ktp. estas nune pli gravaj). Sed li konstatas, ke en Sudgermanio, kie li loĝas, la eklezia reakcio tro malhelpas praktikan uzadon. Polemikante kontraŭ la artikolverkinto en n-o 264, li diras, ke grekaj artistoj ja ornamis siajn skulptaĵojn per figfolioj[1], sed ke en "gimnazio" la grekoj ekzercis sin tute nude.

K-do Moravec (14 624), Germ., same polemikante kontraŭ la artikolo en n-o 264, ne komprenas, kial ties aŭtoro nomas la ŝirmatajn korpopartojn "ornamaj", konstatas, ke la nudeco de l' korpo estas la sama por brako kiel por seksorganoj. La kulto de l' figfolio ŝajnas nepravigebla precipe, ĉar la aŭtoro mem konfesas, ke hodiaŭ 5-jaraj geknaboj jam konas la partojn en realo. La ĉefa afero por lia rifuzo sekve ne estas morala. Kiam li skribas pri tuŝiĝo kun "sia" (ne de l' aŭtoro!) edzino, li per tio esprimas, kvazaŭ la edzino estus posedaĵo. Edzino, ankaŭ la juna, estas homo kun rajtoj. (Tiujn ĉi frazojn elpensis *viro;* ankaŭ viroj estas progresemaj!) Lia konsolo "venos la tempo . . ." ne estas pozitiva solvo, kia estas la konscia ago en persona vivmaniero, malgraŭ moko k "agrabla" recenzo . . .

K-dino 1615 (Germ.), indignante, kiel K-do Barmin traktas la bildon al artikolo pri nudkulturo en n-o 246, opinias, ke tute ne domaĝas al la reputacio de SAT sin okupi pri tiaj temoj. Ŝi respondas al la demando, ĉu al juna edzo estus agrabla vidi sian edzinon nuda inter aliaj viroj, jese en la nomo de sia edzo.

K-do 14 359 (Germ.), rimarkigas al la art. de K-do Barmin: Ni ne nudkulturas, ĉar nepre ĉiu korpoparto bezonas sunradiojn, ankaŭ ne pro sensaciemo aŭ por partopreni je seksaferoj. Ni volas forpreni sekreton de l' seksa problemo, kiu favoras avidemon. Certe por K-do B. estus same malagrable, ke renkontiĝu senveste diversviraj edzinoj, kiel por mahometanoj estis malagrable, ke promenu virinoj sen kovrita vizaĝo. Se SAT nur volus subteni problemojn ĝenerale akceptitajn, ni ne bezonus organizon. Kaj se la tuta homaro fumadus k trinkadus, ĝi ne malhelpu nin junajn gehomojn konstrui novan moralon.

K-do 13 906 (Svedio) opinias, ke en la nordaj landoj oni verŝajne ne trovos multajn adeptojn por la ideo pri "nudkulturo". Se oni en sudaj regionoj suferas pro varmego, iri nudaj estas racia afero, sed starigi la ideon pri nudeco kiel ian racian intereson por la tutmonda laboristaro estas vana. Personoj, kiuj laboras, bezonas vestojn por ŝirmi sin. Ne ĉiu ekstrema idealismo estas laborista intereso aŭ signifas evoluon en la homa vivo. Ofte personoj, kiuj elpensis iun novan pli malpli strangan ideon, provas trudi ĝin al la laboristaro kiel preskaŭ proletan devon, k neakcepto ĝia estas ofte interpretata kiel inklino al burĝeco. Nud-"kulturo" ŝajnas al mi ideo neaplikebla en ordinara homa vivo, k speciale la laboristoj devas ĝin rifuzi unuavice pro praktikaj kaŭzoj.

Per tio ni fermas la diskuton pri la temo.

[1] Vidu pri la kaŭzo rimarkigojn de K-do 641 en n-o 270 (sama rubriko).

"Nia gazeto estu ĉiam klasbatala"

K-do 10 380 en n-o 266 demandas: Kio estas vegetarismo? En la antaŭa frazo li opinias, ke Vegetarana Paĝo por ni ne necesas. Mi kontraŭstaras: Necesas klerigaj artikoloj, unue ĉar demandoj ekzistas (pruvo: la demando de 10 380) k due, ĉar necesas korekti la opinion de nia K-do. SAT-vegetaranoj, ankaŭ aliaj lab. vegetaranoj ne havas la intencon malhelpi klasbatalon kiel burĝaj pacifistoj. Male, la bazo de l' vegetarana opinio estas *justo — por* la bestoj kiel por la homoj, k la batalo pro justo inter homoj nomiĝas klasbatalo. Fontoj de l' vegetarismo k de l' klasbatalo similas! Mi ankaŭ estas kontraŭ aĉigoj. Sed, K-do 10 380, nomu la vegetaraĉojn! Kiel protestoj (skribaj?) povus malhelpi militajn barbaraĵojn, tion mi ne komprenas. Sed per vegetarismo la barbara maljusto kontraŭ bestoj estas forigata.

Necesego de la klasbatalo ekzistas, sed la batalo estas pli facila, havas pli grandan ŝancon je sukceso, se la Gek-doj-kunbatalantoj havas senton por justo, akrigitan per vegetarismo.

14 624, Magdeburg (Germ.).

Faktoj el Nederlando

El la statistiko de l' ŝtatenspezoj mi notas jenon (impostjaro 1926/27):

Grandeco de la imposteblaj enspezoj				Nombro da impostpagintoj en %	Sumo de la enspezoj en %
800	ĝis	1 400	guldenoj	40,42	18,66
1 400	„	2 000	„	28,86	20,58
2 000	„	3 000	„	16,57	16,77
3 000	„	5 000	„	8,69	13,85
5 000	„	10 000	„	3,77	10,84
10 000	„	30 000	„	1,38	9,34
30 000	„	100 000	„	0,26	5,51
pli	ol	100 000	„	0,05	4,45

Montriĝas do, 1. ke preskaŭ 70% de l' impostpagintoj havis malpli ol 2000 guld. da enspezoj; 2. ke nur 5% de l' pagintoj ĝuis pli ol 5000 guld., dum tre malmultaj havis vere grandegan enspezon. Sed, konsiderante la elcentojn de la tuta socia enspezo, oni rimarkas, ke la 70% de la plej malaltaj grupoj sume "ĝuas" nur 38%, kaj la 1,69% de la **plej altaj grupoj ĝuas** 1/5 de l' tuta enspezo.

M. van Essen.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 11 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 11

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

NIA LABORPROGRAMO

Akceptita dum la fakkunsido de l' 9-a SAT-Kongreso

Celo

1. Helpi per esperanto al la proleta liberpensa movado

Praktikaj taskoj: Organizi "Liberpensulan Gazetservon", aperigi liberpensulajn paĝojn en laboristaj esp. gazetoj kaj ĵurnaloj kaj apartajn artikolojn, helpi al liberpensulaj proletaj organizoj, kolekti materialon por aranĝo de kontraŭreligiaj muzeoj k ekspozicioj k liveri al ili postulatajn informojn, aranĝi dum la kongresoj de SAT, LEA k UEA fakkunvenojn.

2. Propagandi esperanton en liberpensaj organizoj

Praktikaj taskoj: Disdoni varbfoliojn, aranĝi varbparoladojn, aranĝi kursojn, sendi reprezentantojn aŭ salutskribojn al la ĉefkunvenoj de la liberpensulaj organizoj k tie proponi poresp-ajn rezoluciojn.

3. Batali kontraŭ religio per esperanto, kontraŭstarante peresp-an propagandon de religioj

Praktikaj taskoj: Traduki gravajn verkojn en esperanton krei originalan proletan liberpensulan literaturon en esperanto k instigi la SAT-Eldonkooperativon eldoni ĝin.

Membreco

Povas esti membro ĉiu proleta liberpensula SAT-ano deviganta sin aktive kunlabori en la Sekcio. Ĉiu membro pagas laŭplaĉan kotizon. La pagantaj sekcianoj ricevas senpage la bultenojn de la Liberpensula Gazetservo.

Praktikaj taskoj: Studi la agadon de religiaj organizoj k en siaj artikoloj senmaskigi ilian klasan burĝan esencon, malutilon de religio por la proletaro ktp. (Studi liberpensulan agadon en sia lando k informi pri liberpensula movado la gazetservon.) Por la sama celo kolekti taŭgan por liberpensula-ateista propagando materialon el religiaj k liberpensulaj prikulturaj, politikaj gazetoj k ĵurnaloj rilate al jenaj temoj: Ŝtato k Eklezio — Eklezio k Lernejo — Leĝaro pri eksiĝo el Eklezioj — Ŝtatsubvencio al Eklezio k sektanoj kompare kun tiu al popolsanigo, popolklerigo ktp. — Leĝoj pri edziĝo k eksedziĝo — Agado de Eklezio k Sektoj — Kremacio k kremaciejoj — Batalo eklezia k sekta kontraŭ proletaro — Statistiko prireligia — Statistiko pri liberpensula agado k movado — Formo k metodoj de la liberpensula movado k propagando — Milita danĝero — Faŝismo k religiaj organizoj — Religio k virinoj — Religio k junularo — Kongresoj religiaj k liberpensulaj. Sendi tradukita aŭ prilaborita en speciala artikolo supremenciitajn materialojn al Liberpensula Gazetservo (Traduki en nacian lingvon materialon de Liberpensula Gazetservo k Liberpensulaj Paĝoj aŭ speciale ricevitajn leterojn en esperanto, multobligi ilin k dissendi al liberpensulaj k laboristaj gazetoj). Kolekti bildojn, afiŝojn, flugfoliojn, laŭeble eĉ religiajn objektojn por kontraŭreligiaj ekspozicioj k muzeoj; precipe estas dezirindaj materialoj karakterizantaj aŭ ilustrantaj sukcesojn en la liberpensula movado (ekz. foton de likviditaj preĝejoj, en kiuj estas aranĝataj kulturejoj porproletaj, kremaciejoj, liberpensulaj orfejoj ktp.). (Plenumi la taskojn sub celo 3.) Registri ĉiujn sukcesojn de sia laboro k informi pri ili la Sekcion.

Gvidado

La Sekcio estas gvidata de Komitato, kiu konsistas el sekretario-kasisto, redaktanto k la landreprezentantoj. La komitato estas elektata dum la fakkunveno de SAT-kongreso por unu jaro.

Taskoj de la sekretario-kasisto: Prizorgi laborplanon de la Komitato, interkonsiliĝi kun aliaj komitatanoj pri ĉiuj taskoj de la agado, interrilati je la nomo de la komitato kun diversaj organizoj ktp., aranĝi la fakkunvenon dum SAT-kongreso, kolekti kotizojn k eltrovi aliajn metodajn rimedojn por plifortikigi la kason de l' Sekcio k konservi ĉiujn dokumentojn certigantajn elspezojn de la kaso.

Taskoj de la redaktanto: Redakti Liberpensulajn Paĝojn k aperigi Liberpensulan Gazetservon; kontaktiĝi kun landaj liberpensulaj presorganoj, prepari eldonplanon de liberpensa literaturo.

Taskoj de la landreprezentantoj: Observi k helpi la agadon de la sekretario-kasisto k redaktanto, revizii la kason, gvidi la fakkunvenon dum SAT-kongreso, fondi k gvidi Liberpensulajn Sekciojn en LEA-organizoj, aranĝi fakkunvenon dum la LEA-kongresoj.

Financoj

Financoj de la Sekcio konsistas el la laŭplaĉaj kotizoj de la sekcianoj k la kotizoj de la subtenantaj liberpensulaj organizoj.

Fakkunveno

La fakkunveno de la SAT-kongreso estas prezidata de la ĉeestantaj komitatanoj. La tagordo devas enhavi: raportojn de la sekretario-kasisto k redaktanto k kasrevizio, baloton de la komitato. Dum la kunsido havas decidrajton la ĉeestantaj reprezentantoj de la subtenantaj liberpensulaj organizoj.

Sekcianoj!

La Internacio de Proletaj Liberpensuloj demandas nin, ĉu ne estus ebla, fondi per la esperantistoj-liberpensuloj, proletajn liberpensulajn organizojn en jenaj landoj: Anglio, Hispanio, Holando, Sudameriko. Ni petas niajn sekcianojn en la nomitaj landoj, speciale niajn reprezentantojn, pripensi la aferon kaj tuj kun ni interrilati.

La gazetoj "Atheist" kaj "Der Gottlose" (Sendiulo), la unua nomita gazeto estas la organo de la IPF kaj la dua aperas en Germanio, nun ankaŭ portas la surpreson "Oni korespondas esperante".

La redaktanto deziras ricevi foton, bildon aŭ ilustritan karton pri la kremaciejo en via urbo kun sciindaj notoj; helpu kompletigi nian kolekton.

Nia poŝto. Individuaj skribaĵoj k liberpensaĵoj, nur estas prirespondataj respektive forsendataj se vi kunsendas internacian respondkuponon por la afranko. *1447.* Vian lastan skribaĵon mi sendis al Lublin al K-do 2798. *5508.* Mi jam ricevis la saman artikolon de K-do Bulba antaŭ kelkaj monatoj; kies traduko estas la pli bona?

Liberpensuloj-esperantistoj de la tuta mondo, sendu viajn adresojn al Centra Ateist-Esperantista Oficejo de USSR. Ĉiu adreso estos enpresita en Sovetiaj esp.-gazetoj senpage kaj rekomendita al sovetiaj ateistoj-esperantistoj. Sendu laŭ la adreso: Moskvo 26, Ĥavskij 11, kv. 137, N. Incertov (por Ateista Esperanto-Oficejo).

D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ, USSR, Kiev, Klovski Spusk 2, sendas sovetaĵojn k ukrainaĵojn kontraŭ liberpensulaĵoj k esperantaĵoj. Nepre respondos.

FABELOJ de Hermynia Zur Mühlen

Kion rakontas la amikoj de Peĉjo

Lerte verkitaj sociaj rakontetoj en fabela formo, forte agitantaj por niaj socialistaj ideoj. Simpla lingvo k stilo garantias ĝuan legadon ankaŭ al komencantoj.

Prezo 0,60 gmk. — 56 pĝ.

Administrejo de SAT, R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.



N-o 11 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 12. Decembro 1929

EL KANADO

Striko de arbarlaboristoj en "Ontario"

(Esperanto-Servo.) En la norda provinco de Kanado, "Ontario", dum ĉiuj vintrosezonoj multaj laboristoj serĉas okupon en arbaro. Tiuj arbarlaboristoj gajnas 25—40 dolaroj monate k manĝon. Sed ili devas labori de frumatene ĝis malhela vespero. Komparante ilian gajnon kun tiu de aliaj laboristoj (industriaj), ili ricevas la plej malaltan salajron. Nun tiuj mizeraj viv-cirkonstancoj eksplodigis strikon de la arbarlaboristoj, kiuj organizas sin k batalas por pli alta salajro. Dum verkado de ĉi raporto partoprenas la strikon 600 arbarlaboristoj, kiuj tre esperas venki. *(13 341)*

Laboristoj venkis dum striko en "Hamilton"

(Esperanto-Servo.) En la granda fabriko, nomata "Nacia Ŝtalvagonara Kompanio", en la urbo Hamilton strikadis la laboristoj dum sep semajnoj. La kaŭzo estis, ke la kompanio provis, malaltigi la salajron je 50%! La laboristoj estis tre solidaremaj k komune daŭrigis la strikon ĝis la venko. Dum la striko la laboristoj fondis Union k alvokas ĉiujn laboristojn, laborantaj en ŝtalfabrikoj, komune lukti kontraŭ la provoj flanke de kompanioj, malaltigi la salajrojn. La strikvenko de la laboristoj en la Nacia Ŝtalvagonara Kompanio estas plej signifa k fortiganta por ĉiuj laboristoj en tuta Kanado. *(13 341)*

EL RUMANIO

Oni timas pro la sovetia landlimo

(Esperanto-Servo.) Antaŭ kelke da tempo aperis "stranga" ordono de la ministro por internaj aferoj, al la minej-posedantoj. Oni pripensis, ĉu la minejoj kuŝantaj proksime de la riverego Dnjestr (kiu estas landlimo inter Rumanio k Sovetio) estas bezonataj por ekspluatado, aŭ ĉu oni povus ilin ĉesigi. Sed fine oni konstatis, ke tio ne estas ebla. Pro tio la registaro eldonis severegan ordonon, kies ĉefaj punktoj estas: Sur teritorio malproksime ĝis 15 klm. de la landlimo, nur rajtas labori rumanaj laboristoj. La posedanto devas doni skriban garantion pri ĉio, kio okazas sur teritorio de siaj minejoj, li ankaŭ devas atesti, ke liaj laboristoj ne estas danĝeraj k emaj por danĝerigi la nunajn regnon k sociordon. La posedanto ĉiusemajne devas prezenti noman liston de siaj laboristoj al la loka polico resp. ĝendarmejo, li ankaŭ devas zorgi por tio, ke liaj ministoj havas personan atestilon kun foto. Krome li devas sciigi al la kompetentuloj la nomojn de tiuj laboristoj, kiuj dum nokto laboras. Eksplodemajn materiaĵojn oni devas forigi de sur la teritorio de minejo. Oni devas fari raporton, kiom da eksplodema materiaĵo estas uzita potage. La kvanton de uzota dinamito fiksas alia regna komitato. La dinamitaĵoj devas kuŝi en specialaj konservejoj, kiuj devas havi fortan k plej komplikan seruron. Tiuj konservejoj estu gardataj de bonkondutaj k precipe religiemaj k patriotaj soldatoj. — Ĉi-ĉio estas el la plej novaj dekretoj de la popolamanta, pacema k demokrata naci-vilaĝana Maniu-registaro . . . *15 080, Arad.*

Familioj de mortigitoj ne meritas subtenon

(Esperanto-Servo.) Antaŭ kelkaj monatoj la sangmana registaro de *Maniu* okazigis kruelan sangbanon en Supeny (Ĵilvala minejo). Kvankam poste oni ĉion promesis, por pli bonigi la staton de la familioj de mortigitaj ministoj, la polico eĉ konfiskis monsumojn dediĉitajn por tiu celo. La 23-an de novembro la Unuec-Organizo sendis K-dojn Paŭker k Dobrodnse, por disdoni monsubtenojn al la edzinoj de mortigitoj. Jam estis disdonitaj kelkaj mil da leoj, kiam subite aperis la polico, kiu arestis la K-dojn k konfiskis la ankoraŭ ne disdonitajn 19 mil leojn, pretekstante, ke la mono estas de la Ruĝa Helpo k ne de la Unuec-Organizo. Jen, "demokrata" Rumanio. *15 080, Arad.*

EL ESTONIO

"Oni devus vin ĉiujn mortpafi"

(Esperanto-Servo.) Senlaboreco estas en Estonio tre granda. En somero la laboristoj pli-malpli trovas laboron, sed kun komenco de vintro ili restas sen laboro. La malsato igas la senlaborulojn, peti ĉe ŝtata oficejo pro registriĝo en la listoj de ministrejo. Pri tia "registrigo" raportas estonaj gazetoj jenon: En la ministrejo por vojaj aferoj, kie senlaborulinoj petis pro laboro, diris sinjoro jenajn komplimentojn al ili: "vi ne volas labori, vi estas maldiligentaj, mallaboremaj, komunistoj, *oni devus vin ĉiujn mortpafi!*" — Espereble tiu "s-ro" ankaŭ foje sentos malsaton . . . *N. R., Pärnu.*

Religiaj seks-malvirtigantoj

(Esperanto-Servo.) Juna, 24-jara kudristino — senlaborulino, vojaĝis en urbon Narva por serĉi laboron. Post senrezulta serĉado ŝi volis pasigi la nokton ĉe siaj konatuloj. Estante je vespero sur la strato, atakis ŝin du junaj viroj k uzis kontraŭ ŝi perforton, sekse malvirtigante ŝin sovaĝe. Policistoj kaptis la perfortantojn. Ili estas 22-jaraj junuloj — konataj kiel tre aktivaj preĝuloj, anoj de la preĝeja societo "Astra". — Tre bona ekzemplo pri religia frat-amo! *N. R., Pärnu.*

EL GERMANIO

Pastro, respublika juĝistaro k "justeco"

(Esperanto-Servo.) En la urbo Rotenbaĥ (provinco Silezio) loĝas la "senpeka" pastro Ŝram. Sed foje li estis "tre scivolema k malgranda voluptulo". Dum "oficiala konfeso" en la preĝejo li demandis knabinon 13-jaran: "ĉu vi jam havas belan mamon, ĉu vi jam havas la menstruon, ĉu vi jam rigardis kion patro k patrino havas malsupre?" La infano ne volis rakonti tion al siaj gepatroj. Sed, per interbabilado de la infanoj la afero venis inter la loĝantaro. Nun la patro de la infano volis pendigi sin, ĉar li ja estis bona katoliko. Komenciĝis longa torturado: policistoj, la pastro mem, la lernejestro k. a. per demandoj k minacoj volis "aliigi" la rakontaĵon. Sekve de tio la knabino volis memmortigi sin, trinkante puran alkoholon. Sed la knabino tiumaniere ne mortis. Dum la procedo kontraŭ la komunista redaktoro Bievald, kiu malkovris tiun skandalon, la knabino ne aliigis sian unuan rakonton. La "atestantoj" (amikoj de la pastro) volis konfuzigi la knabinon, sed ne sukcesis. Tamen ne la pastro estas punita, sed la komunista redaktoro (monpuno); kompreneble, ja pastro estas anstataŭanto de dio . . . Germanio, la "demokrata" respubliko havas bonan pastraron k bonajn juĝistojn?! *1851, Ŝvajdnic.*

RESPONDA PARTO

Proprajn nomojn nepre skribu preslitere, por eviti nenecesajn preseraroj n.

Aro de raportoj ankoraŭ kuŝas ĉe ni neuzitaj. Ni provos, en plej proksima tempo ilin uzi.

Aktualaj raportoj ne estu samenhavaj, kiel raportoj aperintaj en la gazetaro, ĉar tiel neutilaj. Niaj raportoj havu specialan, prefere memimpresan karakteron.

11-a listo de raportoj en jaro 1929/30

65. Striko de arbarlaboristoj en "Ontario". 13 341 (Kanado).
66. Laboristoj venkis dum striko en "Hamilton". 13 341 (Kanado).
67. Oni timas pro la sovetia landlimo. 15 080 Arad (Rumanio).
68. Familioj de mortigitoj ne meritas subtenon. 15 080, Arad (Rumanio).
69. "Oni devus vin ĉiujn mortpafi." N. R., Pärnu (Estonio).
70. Religiaj seks-malvirtigantoj. N. R., Pärnu (Estonio).
71. Pastro, respublika juĝistaro k "justeco". 1851, Ŝvajdnic (Germanio).

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Diversaj aŭtoroj dividas la evoluadon de la homa intelekto laŭ tri fazoj: la animisma[1], *la* religia *k la* scienca. *Kaj d-ro Sigm. Freŭd, la fama elpensinto de la Psikanalizo, konsente kun tia divido, diras en sia verko:* Totemo k Tabuo, *jenon:*

"En la animisma fazo, la homo atribuas al si mem la ĉiopovecon; en la religia fazo, li ĝin cedis al la dioj, ne tute tamen, ĉar li rezervas al si la povon influi la diojn (per preĝoj, ceremonioj ktp. Trad.) laŭ maniero, kiu igos ilin agi konforme al liaj deziroj. En la scienca koncepto pri la mondo, ne plu estas loko por la ĉiopoveco de l' homo, kiu konscias pri sia malforto k rezigne akceptis la ideon morti, same kiel li submetiĝis al ĉiuj naturaj necesoj. Sed en la fido je la povo de la homa spirito, kiu atentas la leĝojn de la realo, oni ankoraŭ trovas postsignojn de la malnova kredo je la ĉiopoveco."

Kaj en alia parto, klariginte diversajn procedojn de magio, per kiuj la primitivuloj opinias atingi iun celon, unuvorte kontentigi siajn dezirojn, Freŭd konkludas:

"La principo, kiu regas la magion, la teknikon pri la animisma pensmaniero, estas la kredo je ĉiopoveco de la ideoj."

— Sed kion vi celas montri, pruvi per tiaj filozofiaj konsideroj?

— Kion mi celas! nu, rimarkigi al vi, ke nuntempe ekzistas multaj homoj, kiuj kelkrilate restas ankoraŭ ĉe la animisma fazo; ilia intelekto ne tre superas tiun de la primitivulo, kiu opinias per magiaj, sorĉaj, vortaj rimedoj kontentigi siajn dezirojn.

Jen aŭdu tiun oratoron kiu senĉese akcentas siajn paroladojn per krioj kiel: Vivu la Revolucio! Morton al la kapitalismo! k. s. Se li ne estas simpla fiaktoro, kiu ludas rolon, se fakte li kredas, ke tiaj krioj antaŭenpuŝas la revolucian movadon, li certe staras tiaokaze ĉe la animisma *fazo; lia intelekto similas iagrade tiun de la primitivulo.*

Kaj mi tre timas, ke eĉ inter la SAT-anoj troviĝos iuj, kiuj opinios, ke mi fariĝis "kontraŭrevoluciulo" nur pro tio, ke en ĉi tiu artikolo estas forgesite krii almenaŭ trifoje: "Vivu la klasbatalo! Vivu SAT! Morton al . . ."

Mi celas komprenigi, ke tute ne sufiĉas deziregi ion por atingi, ke niaj deziroj estu kontentigataj. Mi celas instigi la SAT-anojn, ke ili penu ĉiurilate forliberiĝi el la animisma k religia fazoj k atingi la sciencan, kie oni ne rilatas al siaj deziroj kiel al tujaj efektivigeblaĵoj.

Antaŭ ol kontentigi sian deziron flugi, la homoj devis konstrui aeroplanojn. Kaj tio postulis longan serĉadon, multe da pacienco k oferoj. Kiuj sin ĵetis el altaĵo en la malplenon, subtenate nur de sia deziro k forta volo flugi, tiuj simple rompis al si la kolon . . .

E. L.

---

[1] La Legantoj, kiuj studis la diversajn sistemojn de filozofio, devas atenti, ke ĉi tie la vorto ne havas la signifon al ĝi donitan de Stahl, sed tiun de Tylor en sia "Primitive Culture".

VIA ABONO FINIĜIS . . .

Proleto, subtenu vian gazeton! —
Ho, ofte vin frapis ĉi trafa devizo!
Kaj ofte plenumis admonon vi peton,
Gazeton vivigis per pag' de l' kotizo.

Vi senhezite komprenis signifon
De l' ĉiutaga ĵurnal' en batalo,
Kaj por garantii prosperan vivon,
Vi ĝoje kotizis; fortiĝis ĵurnalo.

Sed apud la grandaj naciaj organoj
Klopodas, en preskaŭ senbrua modesto,
Mondskale, ide-esprimil' de l' SAT-anoj,
Proleta organo en fremdlingva vesto.

Ĉu vere fremdlingva — gazet' esperanta?
Ĉu vere, prolet', ne la lingvo plej kara?
Perilo fratiga, trans limojn liganta,
Estont-parolilo tutmond-proletara?

For indiferento kaj apatio!
Amike vin gvidu plej bona kunulo . . .
Ne post la aliaj! Sed tuj, antaŭ ĉio
Vi pagu do vian abonon al "S-ulo"!

N. B.

ESPERANTA MORSE-ALFABETO

Mi havas proponon, kiu modifas la alfabeton de K-do Ĥolm, aperintan en n-o 266:

. . . . h	— — — — ĥ
. . . s	. . . — ŝ
— . — . c	— . — — ĉ
. — — — j	— — — . ĵ
— — . g	— — . — ĝ

En Germanio k Ĉeĥoslovakio oni uzas 4 punktojn por la **h** k 4 strekojn por la **ĥ** (ĉeĥe ch). La signo por **ĉ** similas nun signon de **c**, nur ŝanĝita estas la lasta punkto al streko. La signo **ŝ** ankaŭ havas strekon pli ol la signo de **s**. La sama diferenco estas inter **ĝ** kaj **g**.

K-doj praktikadantaj povas k devas nun diri, ĉu la alfabeto estas uzebla pli bone en interkonsento kun aliaj naciaj aŭ internaciaj morse-alfabetoj. La interpunkciaj signoj morsaj restas la samaj kiel en la uzitaj alfabetoj. Bonaj lernmetodoj akustikaj k optikaj ekzistas multnombraj.

Moravec (14 624), Magdeburg.

Klarigo de la Ekzekutiva Komitato de la SAT-Rondo Nov-Jorka

En sia kunsido de la 9. nov. 1929 la plenuma organo de la loka SAT-Rondo priparolis la artikolon, kiu aperis kun la subtitolo "Defendartikolo" sur paĝo 34 de n-o 263 en "S-ulo".

Antaŭ ĉio ĝi malaprobe rimarkis la aperon de ĉi tiu artikolo pro la fakto, ke ties skribinto devas bazi siajn rimarkojn sur tia senrespondeca diro: "*ŝajnas* esti havinta malsukceson kun siaj grupstudantoj." Tiu diro en si mem pruvas, ke la skribinto ne konas la faktan staton de la afero, sed parolas pro aliaj kaŭzoj k ke la ecoj de kursgvidanto estas nur de flanka intereso al li.

Pri tio ankaŭ atestas la fakto, ke neniu membro de la SAT-Rondo komisiis lin defendi ion aŭ iun. Krom tio K-do 12 452 ne estas samgrupano, ĉar nek estas grava por li, ĉu li aliĝis al organizo aŭ ne, nek estas grava por li pagi kotizojn, nek partopreni kunvenojn.

Ĉar la ecoj de kursgvidanto ne estas diskutpunkto, ni ne tuŝas tiun problemon, sed fingromontras al ĉi tiuj esprimoj faritaj en la artikolo: "*Obstine* insisti, ke la kursanoj sekvu personajn metodojn de instruanto; . . . Li estas kunlaboranto, ne altestaranta superulo; . . . li devas labori el la vidpunkto de siaj lernantoj k ne de sia obstino; . . . Ankaŭ li ne devas esti alimondano (pro kio do tiu rimarko!?) Maljuste K-do Saville parolas . . .

Belega fasko da objektivaj rimarkoj, ĉu ne!? Sed K-do 12 452 estas la sola, kiu scias la rimedojn "Por perfekte instrui maturaĝan grupon" . . .

Strange, ke li estas tiu, kiu plendas, ke "K-do Saville stariĝis sur la monto Sinai k proklamas al siaj kunsuferantoj (!), aliaj grupinstruantoj, ke gruplernantoj estas maltaŭga aro da personoj, kiuj ĉiam scias pli multe ol ilia instruanto . . ." Vere, strange vere!

La E. K. de la loka SAT-Rondo Nov-Jorka atendas de la nun vojaĝanta, kritikema SAT-ano, ke li tuj post reveno aliĝu al la loka SAT-Rondo kaj post aliĝo pli regule ĉeestu la kunvenojn k poste el la fonto de sia riĉa scio superverŝu nin instrue, ĝis ni ĉiuj atingos la same altan nivelon de klero, kiun li pretendas havi. Ĝis tiam la E. K. humile opinias havi la rajton konsili, ke tiu K-do kondutu pli laŭorganizane.

Membriĝo en organizo trudas voleakceptitajn devojn, inter kiuj respekte rilati al ĉiuj organoj ne estu la lasta. Ofte nur la malo estas konstatebla k la funkciuloj estas la bubobatatoj

fare de tiuj, kiuj scias multe kritiki, sed fari pli bone ne kapablas.

Ĉi-lastan konkludon la E. K. opinias ankaŭ trafa por nia tuta SAT k ĝenerale k tial estas nia voko: Agadi organizatece estas necese unualoke; poste ĉiu rajtas kritiki!

Laŭ komisio Th. Weder (1307).

Radio-Nederlando

La Nederlanda Federacio de Laboristaj Esp-istoj ricevis permeson de Laborista Radio Asocio (VARA), stacio Hilversum, disaŭdigi je *14. 12.* (sabate) de 20.40 ĝis 20.55 h. MET esp. programon. Ondlongo 1071. — Koresp. adr.: K-do P. Faulhaber, Marathonweg 15, II, Amsterdam.

Komunlaboristoj atentu!

En sia lasta kunveno en Berlin (okt.) la reprezentantoj de la internacia federacio de la personaro de komunumaj entreprenoj atentigis pri la valoro de faritaj spertinterŝanĝoj internaci-skalaj. Oni decidis eldoni komence de la jaro 1930 regulan trimonatan sciigilon en *diversaj lingvoj,* per kiu oni raportos pri ĉiuj gravaj aferoj en la sfero de l' aliĝintaj organizoj, ekz. laborkondiĉoj, salajroj, sociaj k laboraj rajtoj, kondiĉoj de tarifkontraktoj de ŝtat- k komunumlaboristoj ktp. Plej necesa tasko de l' oficejo estas esplorado k publikigo pri organizaj cirkonstancoj de l' diverslandaj al la sindikata ligo aliĝintaj organizoj. Ankaŭ rilate al studvojaĝoj en diversajn landojn necesas havigi antaŭe akuratajn informojn por atingi la celon de tiaj vojaĝoj. Ĉiuokaze ni esp-istoj devos provi utili al la oficejo per esp.informado, devas mem peti diversajn informojn k esprimi la deziron, ke la sciigilo ankaŭ aperu esplingve. La adreso de l' federacia sidejo estas: Berlin SO 36, Schlesische Str. 42.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Klasbatalaj gazetoj

La 4-a n-o de esp.-lingva ISK-gazeto (ISK = Internacio por Socialista Kunbatalo), la lasta de l' unua jarkolekto, enhavas du rimarkindajn artikolojn. Unu estas parolado farita de M. Ŝpeĥt je la memoro de L. Nelson, "laborinto por justeco", nelonge post lia morto. Interesa estas precipe ekkoni la admiron de Nelson por Lenin, ne kiel komunisto, sed kiel homo, kiu konsekvence aplikis siajn ideojn. La tutan paroladon de tiu virino travibras arda adoro, tiu de disĉiplo al majstro. — En dua artikolo (Internacia Socialista Organizado) A. Moore studas la karakteron de l' ĝisnunaj politikaj Internacioj k konkludas, ke en ideala Internacio la membroj ne devas esti sendependaj naciaj partioj, (Ĉu tiaokaze taŭgus la vorto "Internacia"?), ke tia Internacio devas havi komunan prol. edukon. La aŭtoro opinias, ke ĉe anoj de la lab. klaso ekzistas sufiĉe vasta intereso pri internaciaj aferoj, sed ke necesas direkti tiun intereson tra organizitaj kanaloj. Kelkajn lingvajn mankojn ni trovis en tiu kajero.

Post kelktempa interrompo reaperas *"Balkana Laboristo"* (organo de prol. espistoj en Bulgario), kun neŝanĝita vizaĝo, t. e. senkompromise unutendenca. Krom esp-lingva parto (rev. literaturo) ni trovis en n-o 2 tradukojn el "S-ulo", "LNE" k esp-a "Mondo". *Laborista Esperantisto* en Nederlando, kiel informilo de bone disvolviĝanta LEA-organizo, okupas sin ĉefe pri internaj organizaj aferoj; ni trovas ankaŭ nacilingvajn propagandartikolojn kiel "Lab. junularo k esp-o". En ĉiu n-o krome troviĝas atentigoj pri SAT k montriĝas klopodoj vivigi la en Göteborg akceptitan konvencion inter SAT k LEA.

N. B.

Ankoraŭ faka revuo akceptas esperanton

Post kiam la Moskva abelista revuo akceptis esp-on por sia eksterlanda fako, nun ankaŭ la gazeto "Abelo k Abelejo" (adr.: *Sverdlovsk,* Uralsk. obl. Dom Krestjanina, Ĥlebnaja ploŝĉ. USSR) alvokis esp-lingve por interligo kun alilandaj abelistoj esp-istoj k intencas presigi en la gazeto la plej interesajn artikolojn en esp-o. Eksterlandaj samfakanoj subtenu la intencojn de la redakcio en la servo de nia movado!

ĈE LA RELIGIULOJ

La *katolika* esp. movado (ĝia organizo IKUE) montras por 1928/29 laŭ la kongresraporto nur malgrandan progreseton: 1443 membroj en 1929 kontraŭ 1373 en antaŭa jaro. La plej granda membrokvanto (567) estas en Nederlando, sekvas Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥoslovakio en granda distanco. En Italio la organizo preskaŭ mortis. Ĉefaj lastjaraj progresoj en Belgio k Ĉeĥoslovakio.

* * *

La *Oomoto*-propaganda organizo en Eŭropo alvokas kolekti monsumon (ĉ. 1 milionon da dolaroj!) por starigi "Domon de Homamo" en iu centro de Eŭropo "kiel simbolon de nova epoko, kiu gvidos la homaron al vera kredo . . .". Ĝis nun kolektiĝis nur 3773 fr.fr. (= ĉ. 135 dol.). Ni atendu pacience, sed scivoleme, por ekscii kiom da mono donacos la kreduloj. Tre certe la miliono kolektiĝos, se la admirantoj de lia mesia moŝto Deguĉi estas tiom riĉaj, kiom . . . malsaĝaj.

NE SENDU TRO LONGAJN ARTIKOLOJN! VERKU KONCIZE!



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Poemaro el Hungarlando (hungaraj poetoj de la XVI-a jarcento ĝis niaj tagoj). Esperantigis Francisko Szilágyi. Eldono de la "Vajda János", Literatura Societo, Budapest 1929. 89 pĝ. Form. 13×20 cm. Prezo nemontrita.

El la lando, kies cigana muziko nin ĉarmas, alvenas kolekto da poemoj el inter la plej eminentaj cerboj de la hungara popolo, en vesto, kiu nin ĉagrenas . . .

Jam cetere la lingvo de la p r o z a j antaŭparolo k finvortoj montras al ni, ke la interpretisto entreprenis tro riskan agon: meti esp-an veston al hungaraj poemoj k ne mire, ke li bankrotis. Ni ne dubas, ke ĝi povis esti bona ekzerco por la tradukinto, sed tute nenecesa monelspezo por la V a j d a J á n o s. Ĉu tiu societo ne povis transdoni la aferon al pli kompetentaj manoj, al pli talentaj interpretistoj, kiuj ja tute ne mankas en Hungario?

La tradukinto (kompreneble!) ne forgesis al la fino de tiu P o e m a r o meti sin en la liston de la plej eminentaj hungarlingvaj poetoj, per — originala esperanta poeziaĵo! Se la tradukinto intencis al la florbukedo de hungara poezio aldoni nomojn de hungaraj e s p - a j poetoj, tiam ne mankis a l i a j nomoj, kiuj almenaŭ donis ion el si al nia poezio. S. G.-K.

Amuzaj Rakontetoj originale verkitaj de Pekef, skribitaj en esperanta stenografio Duployé-Flageul. 16 pĝ. Form. 10½×16 cm. Prezo 1.50 fr. fk. Eld.: Esp. Stenografio, 9, Bd. Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francio. 1929.

Nur sciantoj de l' nomita stenografisistemo povas ĝui la enhavon de tiu en tre modesta formo prezentita kajero, hektografe presita. (Kiu mendos la broŝuron, ricevos je deziro senpage lernolibron de l' Flagöla stenografio.)

Lies and Hate in Education (Mensogoj kaj Malamo en Edukado) de M a r k S t a r r. Eldonejo: Hogarrth Press, 52 Tavistock Square, London W. C. Form. 12×18 cm. 194 pĝ. Prezo 5 ŝil.

En la antaŭparolo, nia bone konata K-do SAT-ano diras, ke li ne povus kolekti la tutan materialon por ĉi tiu libro sen la helpo de aliaj SAT-anoj; esperanto cetere estas ne malofte menciata kiel grava helpilo, kio plej trafe diskonigas nian aferon. Ni rekomendas la dokumentoriĉan volumon al ĉiuj anglolingvanoj.

Klucz do Esperanta. Esperanto-Ŝlosilo (modelo Ĉefeĉ) en pola lingvo. Prezo: 50 gr. Form. 7,5×11 cm. 48 pĝ. Havebla ĉe Eldonejo "Esperantista Voĉo", Jaslo.

La konata konciza gramatiko k vortareto por pollingvanoj. Bedaŭrinde mankas en ĝi adresoj de Pola LEA k SAT.

D-ro Herm. Grossmann, La esenco de l' Bahaismo. Trad. H. Greff. Eld. Bahaa Esp.-Eldonejo, Wandsbek (Germ.), Postfach 8. 8 pĝ. Form. 15×23 cm. Prezo ne indikita.

Tre konciza resumo pri l' esenco k celoj de l' Bahaa religi-movado k ĝia pozicio al div. vivproblemoj.

D-ro Pfeffer, Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Tagblatt-Biblioteko, Steyrermühl-Verlag, Wien I, Wollzeile 20. 48 pĝ. Form. 12×19 cm. Prezo ne indikita.

La tria eldono de tiu ĉi praktika vortaro, kiu entenas ĉiujn oficialajn radikojn de l' Akademio (tiuj de l' kvara Aldono estas aparte aldonitaj) k la plej ordinarajn fakesprimojn.

SIVAĜI de Lakshmiswar Sinha, Sceno el Hinduja historio de la 17-a jarcento. Form. 20×13 cm. 68 pĝ. Prezo: sved. kr. 1.50. Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1929.

Oni devas laŭdi la entuziasmon de la juna hindo L. Sinha, kiu, post "apenaŭ unujara lernado" de esp-o, traveturas Svedion farante esp-ajn lekciojn k kiu eldonis sian unuan verkon en esp-o. Ĝi estas en la formo de dramo k priskribas la lukton inter Sivaĝi k Aŭranĝeb, reĝoj de Norda k Suda Hindio respektive k la perfidon de tiu lasta.

Bedaŭrinde la verkad-maniero ne pravigas la alprenon de tiom ambicia tem-formo k ankaŭ la aŭtoro prefere estus doninta al ni simplan rakonton riĉigitan per klarigoj pri hindaj kutimoj k moroj. La verko ne estas literatura, havante neniajn ideojn originalajn k eĉ kelkaj pecoj alproksimas banalon. Ekz. la reĝino *Lilavati* diras: "Se via popolo ne sufiĉas, estu certa, ke via reĝino iros en batalkampon por savi siajn infanojn" k. s.

La verko nek pli estas bona por ludi, ĉar, krom la abrupta, naiva frazaro, la scenoj estas tre mallongaj, kelkaj el nur 5, 6, 8 frazoj. Estas 10 scenlokoj, kelkaj uzataj ripete. Ankaŭ la scenlokoj ne estas akurate presitaj: diroj de du personoj estas kunigitaj ktp.

Ĉu la antaŭvorta promeso, doni "ideon pri tiu tempo en Hindio" estas plenumita? Mi kredas, ke ne; preskaŭ ne ĉeestas klarigoj pri ĝi. Tamen, oni ne senkuraĝigu *junan* aŭtoron pro lia *unua* verko; li donis skizon pri interesa historia epizodo. Lia esp.-lingvo estas ĝenerale bona, kvankam li uzas la vorton "mistika" ofte k strange (devus esti "mistera"!), ankaŭ la neologismon "mesaĝo" (por "sendita diro") k. c. La libreto estas bele presita.

E. K. L.

Die Linkskurve (La maldekstrenkurbiĝo). Monata revuo. 1-a jaro. Kajeroj 3, 4. Eldonantoj: J. B. Beĥer, And. Gabor, K. Kläber, E. Vajnert, L. Renn (revoluciaj verkisto). Prezo: 0.30 mk. g. po kajero, 32-paĝa. Form. 14×21 cm. Intern. Arb.-Verlag, Berlin C 25, Alexanderstr. 28. Germanlingva.

Enhavo: Kritikoj pri 1-a burĝaj literaturo, scenejo, lernejo; laŭdartikoloj pri sovetia kulturpolitiko; anoncoj pri novaperintaj, ĉefe kom. - tendencaj libroj.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Volksstimme, Chemnitz, 23. 11., Mortintfesto en Serbio, *Krasni Tid*, Iv. Voznesensk, nov., El Ĉinio (255), *Balkana Laboristo*, Sofio, n-o 2, okt., Vojaĝo tra Sov. (de 12 452), *Pravda Severa*, Arĥangelsk, 25. 9. Nacia festo en Hisp. (258), 10. 10., kapit. en lab. vivo (fragm., 256), Sunday Worker, London, 24. 11. (alvokoj en esp-o el n-o 267).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Volksstimme, Chemn., 5. 10., 11. 11., *Glauchauer Ztg.*, 3. 9., 24. 10., 30. 10., *Glauchauer Tagebl.*, 29. 8., 3. 9., *Sächs. Volksbl.*, Zwickau, 10. 10., 23. 10., *Stadt- u. Landztg.* Crimmitschau, 11. 10., *Kinderland* 1930, kalendaro de germ. soc. infanaro (artik. por instigi la infanojn lerni esp-on). *Signalen*, Stokh., 14. 11., 21. 11., *Zaĉistka*, Kiev, 1. 10., *ITF-Bulteno*, A'dam, nov., *Smiĉka*, Petropavlovsk, 7. 10., (alvoko en esp-o), *La Dépêche Dauphinoise*, Grenoble 17. 11., *L'Humanité*, Metz, 21. 11. (ankaŭ pri SAT), *Der Republikaner*, Mulhouse, 29. 10., 25. 11., *Le Progrès*, Lyon, 21. 11.

Peresper. materialon enpresis:

Krasni Tid, Iv. Voznesensk, nov., *Zaĉistka*, Kiev, 5. 11. (tuta pĝ.), *Kieva Proleto*, 7. 11., *L'Humanité*, Metz, 21. 11., *Pravda Severa*, Arĥangelsk, 18. 10., 22. 10., 28. 10., 29. 10., *Komsomolec*, Arĥangelsk, 18. 10., *Volksstimme*, Chemnitz, 5. 10., 8. 10., 15. 11. (sal. al komunum-elekto el Oldham k Amsterd.), *Kämpfer*, Chemnitz (sal. pro rev. datrev. el Leningr., Kaluga k Pskov).

NIA POŜTO

3257. — Jam delonge ĉiu ajn povis legi viajn informojn pri rezulto de balotoj en sia ĉiutaga gazeto! Sekve tia materialo ne taŭgas por "S-ulo". La alian manuskripton ni gardos por "felietono".

10 522. — La unue sendita manuskripto jam en presejo. La lasta aperos resume kun alia simila materialo post kelkaj semajnoj. La materialo por "L. L." estos utiligata laŭbezone.

14 509. — Via artikolo aperos.

3930. — Ni uzos vian artikolon.

13 885. — Via manuskripto presiĝos, — resume, pro abundo je samspeca materialo.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

BRITIO

— Kelkaj gejunuloj dez. koresp. pri ĉ. temoj. Adr.: K-do C. Newman, 25 Simpson Avenue, *Higham Ferrers*, Northants.

ĈEKOSLOVAKIO

— *Tutmondaj Gek-doj!* Kiu sendos (por ekspozicio) sialandajn ilustr. infangazetojn, ricevos nepre kion ajn laŭ deziro. Adr.: K-do F. Ŝilha, *Luze* u. Vys. Myta.

GERMANIO

— Hispana K-do (laboristo), dum libertempo lingvolernanto, dez. koresp. kun germana K-dino. Adr.: G. Munoz, Zimmerstr. 84, b. Pfennig, *Berlin, SW*.

— LEA-grupo dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj. Adr.: K-do Max Franke, *Bösdorf*/Elster b. Leipzig.

Adresŝanĝo. — K-do Gg. Wich (vitristoj), Rohrlachstr. 20, Hth. I., *Ludwigshafen/Rh.*, (antaŭe en Mannheim).

— 4 junuloj, sportuloj dez. koresp. kun Gek-doj ĉl. Certe resp. Adr.: K-do G. Sohr, Poisentalstr. 42, *Freital II./Sa.*

— 14 gelernantoj de esp. kurso ĉe sportunuiĝo "Fichte" serĉas gekoresp-antojn el ĉl. Resp. garantias SAT-ano 9553. Adr.: K-do K. Stutterheim, Prinz-Heinrich-Str. 3/0 r., *Berlin-Lichtenrade*.

HISPANIO

— Gek-doj en finiĝinta esp. kurso dez. koresp., por perfektigi sin, pri sporto, kulturo. lab. vivo, fotado. moroj kĉl. Adr.: K-do José Carnicer, Armas 92, *Zaragoza*.

HUNGARIO

K-do Emeriko Baramjai, I, Horthy Miklos ut. 56, *Budapest*, interŝ. librojn k serĉas koresp-antojn por siaj gelernantoj.

K-do Adalberto Cziffery, I, Nyars u. 1, *Budapest*, serĉas serioz. koresp-antojn el Nederlando k Sud-Ameriko.

K-do Ladislaus Spierer, IX., Üllöi ut. 53-a, *Budapest*, interŝ. esp. gazetojn, librojn nur kun seriozuloj.

PORTUGALIO

K-do Artur L. Ramos, Rua Victor Bastos 64, *Lisboa,* dez. koresp. kun kooperativistoj ĉl. k interŝ. koncernajn propagandaĵojn.

— Pri *Taylorismo* ktp. ni dez. scii la plej bonajn verkojn, ĉu france, angle aŭ germane. Skribu al: S. U. Metalurgica de Lisboa, Rua da Esperança 122, 2^{0}, *Lisboa.*

SOVETIO

K-do J. Karbe, ul. Svobodi 37, kv. 1, *Jaroslavl,* dez. koresp. kĉl. pri politikaj, vivmanieraj temoj, L, PI, gaz., ĵurn. Certe resp.

— 2 Seriozuloj — V. Marionov k I. Kazakov, Krasnoarmejskaja 78, kv. 2, Samara, dez. koresp. kun ekstereŭropaj K-doj pri ĉ. temoj. Certe resp.

— La komsomola ĉelo je la nomo de Karl Libkneĥt, dez. koresp. kĉl pri la vivo de junularo. Adr.: K-do M. Gerasimov, Berezovyi 9, Sergiev, Mosk. gub.

— Junulo (17 j.), dez. koresp. kun ajnaj gejunuloj ĉl. Adr.: K-do Nikolao Ĉursin, ŝkola gletka, *Kuzneck.* Siberio.

Gravege!

Jenaj grupoj deziras konstante koresp. kun la samaj organizoj eksterlandaj: junkomunista ĉelo, ĉelo de Int. Ruĝa Helpo, radioamatora rondeto, turista grupo, rondeto de komencantoj kaj apartaj studentoj. Sendu multnombre L, PI (bfl), gazetojn, fotojn, esperantaĵojn. Ĉio sendube estos rekompencata. Ni ŝanĝas vortarojn esperanto-diversnaciajn. Adr.: K-do Eŭg. Melnik (SAT-ano 12 874), Goroĥovska 16, Politeknikumo de ligilo, *Moskvo, 66.*

IRH-anoj, atentu!

Nord-landa Komitato de MOPR (I.R.H.) nun organizinte esperanto-kurson por Mopr-anaro de urbo Arĥangelsk, tre volas starigi firman, konstantan korespondadon kaj interligon kun IRH.-ĉeloj kaj ties individuoj en tutmondo. Viaj leteroj estos larĝe pridiskutataj inter la kursanaro kaj taŭgaj leteroj estos utiligataj en loka gazetaro. Ni interŝanĝas per fotoj. :-:-:-:-: IRH.-anoj helpu plivivigi nian laboron. Multnombre revoku.

M O P R

Adreso: U.S.S.R. *Arĥangelsk.* Sevkrajkom MOPR Esperanto-kurso.

K-do Johano Kalaŝnikov, Leninstr. 1, *Semipalatinsk,* dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do P. Belokon, *Star. Saltov,* Ĥark. okr., Ukrainio, dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

En decembro finiĝos multaj abonoj, kiu ne deziras interrompon en la liverado, bonvolu tuj reaboni!

K-dino Olga Maslov (17 j.), Ŝmidta 70, *Livni,* Eleck. okr., dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do Nikolao Gusev, Oetjabrsjkoj ĵ. d., st. *Volĥovo,* dez. koresp. kĉl individue k kolektive, interŝ. gazetojn.

Adresŝanĝo. — K-do Gurov informas siajn amikojn, ke la nova adreso estas: *Stalingrad*/Volgo, Respublikanskaja ul. 13.

K-do M. Timakov, Industrialnij teĥnikum, Ĉeĥovskaja 55, *Taganrog,* dez. koresp. kĉl pri ĉ. temoj.

K-do Umer Agaev, derev. Kiziltaŝ, *Jalta,* Krimeo, dez. koresp. kĉl pri pedagogio.

★

Redakcio de gazeto "ZVEZDA" (stelo)

aperanta en la plej granda ukrainia metalurgia centro, petas *internaciajn labkorojn kaj ĉiujn laboristojn* sendi amase let. k presaĵojn pri lab. vivo k batalo. — *Rekompenco:* post 2 taŭgaj korespondaĵoj — abono al "S-ulo" aŭ alsendo de SAT-literaturo. Adr.: USSR, *Dnepropetrovsk,* gazeto "Zvezda", masviddil."

Gek-doj el la tuta mondo!

Bonvolu sendi al ni salutojn multnombre por nia propagandekspozicio, kiun ni aranĝos la 12-an de decembro 1929. Ni respondos al ĉiu. Sendu tuj! *Lab. Esperanto-Grupo* Wilh. Wieschendorf, Roonstr. 30, *Schwerin i. M.,* Germanio.

K-do V. Abramov, Poŝtkesto 1, *Sizran,* C.-V. ĵ. d., dez. koresp. kĉl pri tekniko. Resp. garantiata.

K-do V. Novikov, ul. Baumana Poslannikov per. 7, kv. 10, *Moskvo 5,* dez. koresp. kĉl, PM.

K-do N. Rusakov (studento en antireligia universitato), Spartakovskaja pl., Baumanskij Kooperativ, Moskvo, dez. koresp. pri ĉ. temoj, precipe pri antireligiaj.

K-do Miŝa Mutjuŝin, 1. Artilerijski per. 4/5, *Odessa,* dez. koresp. PK, fotokartojn. Resp. garantiata.

D-ro K. Lavrentjev, Sadovaja-Samoteĉnaja 2, kv. 12, *Moskvo 6,* dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl, PI, esp-aĵoj.

K-do Brisskij, Bagatogo ul. 37, *Odessa,* interŝ. PK, PI, L, il. gaz. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Gubij, ul. Sverdlova 55, *Odessa,* dez. koresp. kun seruristoj, fervojistoj, pneŭmomartelistoj, fiŝkaptistoj, L, PK, PI, gaz., esp-aĵoj.

K-do Vengorcev, Kniĵni Sklad Centrosojuza, Marosejka 7/8, *Moskvo,* dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

— Laboristoj k junkom-istoj el kudra fabriko dez. koresp. kun samprof. k junkom-istoj el ĉl. Resp. gar. Adr.: *Kiev,* Bratska 16, Ŝvej-fabrika, Jaĉejka LKSM.

— 140 gelernantoj k pioniroj de 2-a laborlernejo dez. koresp. kĉl., L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* 2 Trudŝkola, Ŝevĉenkovskaja ul.

SVEDIO

K-do Gustav Persson, Via Skagene, *Hammarö,* dez. koresp. kĉl., pref. kun aziaj K-dinoj.

K-do Filip Fredrikson, L. 178, *Vingáker,* dez. koresp. kĉl., L, PI.

ENHAVO:

	paĝo
Nacia evoluo en la nuntempo	121—122
El Kanado	122
Letero el Jugoslavio	122—123
"La tigro" mortis	123
Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)	124
Naciisma revigiĝo en la nova Rusio	125
Diskutejo	126
Faktoj el Nederlando	126
Sennaciula Liberpensula Paĝo	127
Esperanto-Servo	128
Tra Esperantio	129—131
Korespondado, Anoncoj	131—132

Abontarifo al Sennaciulo:

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)

Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgoj 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.

MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉekkonto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'-Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)